# ENHAVO


**CSONTVÁRY, LA ALIA PENTRISTO**
Eugene de ZILAH . . . . . . . . . . . . . . . 3
**EL VIAJ LETEROJ…**
René DE CLERCK
Josef DÖRR . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
**LETERO AL NOBEL-PREMIITO**
Trevor STEELE . . . . . . . . . . . . . . . . 7
**KRUCVORTENIGMO 'KVE–113'**
MAGDA-LENA . . . . . . . . . . . . . . . . 10
**GUADALAJARA**
Peter BROWNE . . . . . . . . . . . . . . . 11
**BOMBO EN MIA SAKETO**
Lina GABRIELLI . . . . . . . . . . . . . . . 13
**ILI DIRIS**
Herbert George WELLS
tra Ionel ONET . . . . . . . . . . . . . . . 17
**PROVERBO-ĈIFRO 'PĈ–113'**
Nora CARAGEA . . . . . . . . . . . . . . . 17
**OSIEK-PREMIO '2004'**
Kvin esperantistoj
plej ofte proponitaj . . . . . . . . . . . . 18
Aliaj proponoj. . . . . . . . . . . . . . . . . 19
**ANTAŬ 7 JARCENTOJ : PETRARKO**
Nicolino ROSSI . . . . . . . . . . . . . . . 20
**EROJ EL 'KANZONARO'**
de PETRARKO
el la itala
tra Nicolino ROSSI. . . . . . . . . . . . . . 26
**PAŜO EN BONA DIREKTO**
*Matematika vortaro*
de Marc BAVANT
recenzo
Johan DERKS . . . . . . . . . . . . . . . . 28
**ĈU VI JAM SCIAS… ?** . . . . . . . . . . 30
**MODESTAJ VIVOJ**
*Mistera lumo*
de Julian MODEST
legis Roland PLATTEAU . . . . . . . . . . 31
**ŜAKPROBLEMO 'ŜPB–113'**
elektita de ALGIS . . . . . . . . . . . . . . 31
**INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO '2004'**
*LA ESPERANTA GAZETARO*
**Pécs, Hungario**
17a-23a de julio . . . . . . . . . . . . . . . 35


## FAVORATOJ POR OSIEK-PREMIO 2004:

### William AULD, Ed BORSBOOM
### André CHERPILLOD, Enrico DONDI
### Spomenka ŜTIMEC


**numero 113** **5a de la 19a jaro** **15jun04**

Karaj Amikoj,

En tiu ĉi n-ro Nicolino Rossi prezentas la vivon kaj verkon de Petrarko, la 'patro' de la grandaj Renesancaj humanistoj, naskita antaŭ 7 jarcentoj. Kvankam ni aldonis 4 paĝojn, ne eblis enpaĝigi kelkajn poemojn tradukitajn, ili aperos en oktobro kaj decembro.

En 'Vortoj de la redaktoro' Eugene de Zilah elektis ĉi-foje estetikan vojon. Tra ĝi li vin kondukos al Pécs, en la Csontváry-muzeon.

Ĝuste en Pécs, en suda Hungario, okazos en julio la fina voĉdonado por OSIEK-premio 2004: el 70 validaj proponoj 37 privilegias 5 aŭtorojn, kaj 33 iras al 20 aliaj. André Cherpillod denove staras inter la plej ofte proponitaj, Ed Borsboom kaj Enrico Dondi, unuafoje proponitaj, tuj troviĝas en la roto de favoratoj.

Mankas 'Rakontoj'. Kompense Lina Gabrielli regalas nin per kelkaj surprizaj fragmentoj el sia movoplena vivo.

Ne forgesu: LG-paŭzo daŭros ĝis oktobro. Ne forgesu: anticipa reabono ŝparos tempon kaj monon. Dankon!

Madeleine DE ZILAH